

# Lulkanto en la Regiono Ituki

Prefektejo Kumamoto  
Melodoio notita de R. Hattori  
Akompano donita de M. Sinohara

Molto lento

Nur ĝis la U-lam-ba-no servos  
es-tas al-mo-zu-lo vivmi-  
ni- u min pri- plo-rus, se min

mi, ne-ni-om pli. Ho tuj ĝi al mi ve- - - nu, tuj for-la- - sos  
ze-ras en per-sist' Sed o-ni vi-vas luk- - - se, luksaj zon' kaj  
prenos for la mort', sed post la dom' sur pi- - - no nur ci-kad' pri l'

mi!  
vest'.  
sort'.

2. Mi  
3. Ne-

# Lulkanto en la Regiono Ituki

Prefektejo Kumamoto

Mi estas almozulo,  
vivmizeras en persist'—  
Sed oni vivas lukse:  
luksaj zon' kaj vest'.

Mi estas almozulo  
vagas kun pelvet' en man'.  
Per kruĉo rizkuiras,  
dormas en kaban'.

Nur ĝis la Ulambano\*  
servos mi, neniom pli.  
Ho tuj ĝi al mi venu,  
tuj forlasos mi!

Neniu min priplorus,  
se min prenos for la mort',  
sed post la dom' sur pino  
nur cikad' pri l' sort'.

Ho ploras ne cikado,  
sed amata la fratini'.  
Ne ploru vi, ho franjo  
plor' ĉagrenas min!

Se mortos mi, mi petas,  
enterigu apud voj'!  
Pasantoj floroferus  
min je ĉiu foj'.—

Per floroj kameliaj  
tombornamos oni min.  
Favoros por verŝakvo\*\*  
la ĉiel' sen fin'...

Mi estas sen gepatroj,  
nun sepjara, nur infan'.  
Sed ŝvitas vartistine  
por pecet' da pan'...

Terura estas mango  
ho ĉe fremda familio':  
ne kruda, sed ja pikas  
gorgon ĝi al mi!

Se amas vi la bebon,  
bone manĝu vartistin'!  
Se falos ŝi, tuj trafos  
fal' al l'etulin'.

Ho kion faru do mi,  
beb' baraktas en plorkri'!  
Ho bebo, se vi ploras,  
ploras ankaŭ mi!

Nur por ĉi jar', ĉi tie  
akvon prenas mi por trink'  
Sed kia montrivero  
de nun sevos min?

Ke mi ĉi tie restas,  
estas de tumulto kaŭz'.  
Forlasu mi kaj florus  
floroj sen paŭz'...

Se post forlaso mia  
io florus en ĉi lok',  
ĝi estus nur floraĉo  
certe sen allog'!

Ne alparolu homon  
tian, kia estas mi  
Nek amon nek kompaton  
al mi havu vi!

Ho nasku sinjorin' vi  
bebon! Kaj mi vartos lin.  
Mi zorge vartos por ke  
li heredu vin.

Post ĝua dorm' la bebon  
trafos de regalo sorĉ'':  
ŝmirita per kinako\*\*\*  
kaj sukera dolĉ'.

Kuraĝe supren rampu  
sur la arbon ĝis branĉfin'.  
Se vi mortfalus, tio  
ne koncernas min.

\* Ulambano: Budhisma sankta tago, en kiu oni bonvenigas al la bejmo l' vizitojn de la spiritoj de la mortintoj.

\*\* Ĉe tombovizito oni verŝas akvon sur la tombostonon.

\*\*\* kinako: rafinita pulvoro el fabo.

La Duno de Tosa

(Tosa no Sunayama)

Prefektejo Aomori

Melodio laŭ R. Hattori

Pianoakompano de M. Sinohara

*♩* = 72

Jen la Du-  
- no de To- sa! Na a a ya- e.

*Fine*

Nur se ĝi es- - - tus el riz- mas', ĝin

dis- po- nus vi, ho ŝi- pis- toj el

ok- ci- den- to, ĉar ĝin do- na- - - cus

ni, do- na- cus ja ni! ————— *D.C.*

Jen la Duno de Tosa! —

*Na a a yare.*

Nur se ĝi estus el rizmas',  
ĝin disponus vi,  
ho ŝipistoj el okcidento,  
ĉar ĝin donacus ni,  
donacus ja ni!

Mi forgesis ĉapelon,

*na a a yare,*

ho ve, kunporti del'gastej'!  
Kaj se okcident'  
eknebulas, mordas severe  
al mi amara pent',  
amara ho pent'.

Ekveturis de Tosa,

*na a a yare.*

mi kun kormorda, gala plor'—  
Sed jam pasis la ŝip'  
preter kabon Ozaki. Kaj n  
kuras kun rid' sur lip',  
kun rido sur lip'.

Fojnfalĉa Kanto  
(Karibosikiriuta)

Prefektojo Miyazaki  
Melodio laŭ R. Hattori  
Akompano de M. Sinohara

Larghetto tranquillo

Foj-no-  
Jam ves-  
Pa- sis

falĉ' jam pa- sis for sur ĉi mon- to. Tuj  
per'. Tuj tu- ta val' mal-he- li- ĝos de  
jam l'aŭ- tun- la- bor'. Tra mal- lum' de ves-

mor- gaŭ do, yo ni la-  
nokt- vu- al'. yo Hej ĉe-  
pe- ra hor'. yo i- ras'

bo-ros sur riz- kam- poj. ĉ. —  
val', ni vin es- kor- tu. ĉ. —  
tor- ĉoj jen en stri- o. Ĉ. —

ĉ. por falĉ' de riz- plan- toj. yo.  
ĉ. do foj- non sur- por- tu. yo.  
ĉ. Nup- to- pro- ce- si- o, yo?'

Fojnfalĉa Kanto  
(Karibosikiriuta)

Fojnfalĉ' jam pasis for sur ĉi monto. Tuj morgaŭ do, yo ni laboros sur rizkampoj. ĉ. ĉ. por falĉ' de rizplantoj. yo.

Pasis for jam l'aŭtun-labor' Tra mallum' de vespera hor', yo iras torĉoj jen en strio. Ĉ. ĉ. Nuptoprocesio, yo?

Jam vesper' Tuj tuta val' malheliĝos de noktval'. Yo. Hej ĉeval' ni vin eskortu, ĉ. ĉ. do fojnnon surportu. yo.